


109-a Universala Kongreso de Esperanto
Aruŝo, Tanzanio, 3-10 aŭgusto 2024

**Aliĝu tuj al la 109-a UK!**
*uk.esperanto.net/2024*

# 109-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**ARUŜO, TANZANIO**
**3-10 AŬGUSTO 2024**

**Universala Esperanto-Asocio**

## UNUA BULTENO





## Vi partoprenos en historia momento!

La unuan fojon Universala Kongreso de Esperanto (UK) venos al Afriko! Tio okazos en 2024, en Aruŝo, unu el la plej vizitataj urboj de Tanzanio. Enirpunkto al multaj naciaj parkoj, ĝi havas kiel belan fonon la imponan monton Meru (4 566 m). Aldone al la mirindaj ĉirkaŭaĵoj, Aruŝo ankaŭ havas multon por proponi per si mem.

## Urbo plena de viveco.

Pli ol 400 000 homoj loĝas en la urba zono de Aruŝo, kun pliaj 320 000 en la kampara regiono. Enloĝigita en la 1830-aj jaroj, ĝi jam spertis multajn reĝimŝanĝojn. Konkerita de la germanoj en la 1890-aj jaroj kaj reprenita de la britoj dum la 1-a Mondmilito, ĝi fariĝis tanzania urbo okaze la sendependiĝo en la 1960-a jardeko. Hodiaŭ ĝi estas multkultura urbo kun homoj de multaj devenoj: plimulte tanzanianoj, sed ankaŭ kun eŭropanoj, amerikanoj kaj aliaj. Vivoplena Aruŝo havas multajn rimarkindajn distriktojn kaj interesajn areojn, kun bazaroj, kafejoj, trinkejoj, restoracioj, muzeoj, kulturaj heredaĵoj kaj multe pli!

## Internacia diplomatia centro.

Hejmo de multaj industrioj kaj komercaj sektoroj, inkluzive de bankoj, produktado kaj turismo, Aruŝo ankaŭ estas hejmo kaj sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj ĉefurbo de la Orient-Afrika Federacio.

**TANZANIO** *Neforgesebla!*

## Kilimanĝaro.

Ni ne povas paroli pri Aruŝo sen mencii Kilimanĝaron, kiu estas videbla jam de for, situanta malantaŭ la urbo. Sendube vi estos tentita viziti ĝin kaj vi ne devas grimpi la monton por sperti ĝian belecon. Situante nur ĉ. 80 km de Aruŝo, eblas viziti ĝin per taga ekskurso, kiu certe estas planata!

## Safariaj cellokoj.

La safaria kulturo estas nedisigebla de Aruŝo. La tri plej popularaj cellokoj estas la Kratero Ngorongoro, la Parko Serengeti kaj la Lago Manyara, sed estas multe pli! Tiuj areoj havas nekredeblajn vidindaĵojn, kaj proponas ampleksajn ŝancojn rigardi la famajn bestojn kiel nigran rinoceron, elefanton, leopardon, ĝirafon, bufalon kaj leonon.


## Flughavenoj kaj kongresejo.

La Internacia Flughaveno Kilimanĝaro situas ĉ. 50 km de Aruŝo, kun pluraj transportopcioj al la urbocentro. Krome la Aruŝa Flughaveno disponigas regionajn flugojn. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC), la plej grava en Tanzanio, profesie ekipita konferencejo, kiu jam gastigis UN-Konferencojn, kun multaj hoteloj je piedira distanco. Ĉe la marbordo (apud Zanzibaro) situas la plej granda internacia flughaveno de Dar es salaam JNIA.

## Zanzibaro.

Tanzanio estas turisme alloga ne nur pro siaj mondfamaj safarioj kaj Kilimanĝaro: ankaŭ la spica Zanzibara Insularo, kun nekredeble bluaj akvoj, spicoplantejoj kaj blanka sablo devos esti en via vizit-listo al la lando! Zanzibaro estas jam monde konata pro siaj spektaklaj plaĝoj kun blankaj sabloj kaj turkisaj akvoj – nepre do venu konvinkiĝi pri ili propraokule!





109-a Universala Kongreso de Esperanto
Aruŝo, Tanzanio, 3-10 aŭgusto 2024

Sekureco | Ĝenerale Aruŝo estas sekura urbo. Ĝi konstante ricevas turistojn kaj diplomatojn. Vojaĝantoj devas atenti pri si mem samkiel estus en aliaj turismaj urboj. La loka polico havas specialan turistan kaj diplomatan oficejon 24/7. Pri tiu temo UEA informados detale en siaj komunikoj pri la 109-a UK koncerne ĉiujn interesgrupojn.

Listo de perantoj | Ĉu vi trovas malfacilecon mem aliĝi kaj pagi al la 109-a UK? UEA disponas je listo de perantoj, kiuj povas helpi vin en diversaj mondopartoj. Vidu la liston: https://uea.org/alighoj/perantoj

uea
Universala Esperanto-Asocio